


Flava Rivero

文摘专刊



1/2022

Enhavo

- 3 Milito Ĥino-Japana P. B-ge
- 20 Tri Tagoj sub Liao-Yang S. Epštejn
- 27 La Ĥina Lingvo K. Ĉ. Ŝan
- 29 Ĥina Spirito E. Bünemann
- 35 Malnova Kampo de Batalo Li Hua
- 39 La Centro de la Mapo U. Luin
- 43 La Lastaŭtuna Krepusko R.Kapreleviĉ
- 44 Ĉinaj Paraboloj Venlo Fon
- 46 Lamento pri l' kabano detruita de l' Tu Fu
aŭtuna vento
- 48 Al la “Esperantisto” Ein Freund
- 49 Atendu! Jos. Siml
- 51 Skatolo da Tefolio Yin Jiaxin
- 53 河南世界语运动纪事（续完）
- 60 世运短波


<http://flavarivero.cn>

6-a Jarkolekto

2022 年第 1 期 总第 11 期

主编：张雪松

编辑：黄河编辑部

出版：世界语工作室

邮箱：redakcio@126.com

网址：http://www.esperanto.studio

Milito Ĥino-Japana

P. B-ĝe

I

3

En la nuna tempo la atenton de la Eŭropa societo okupas la kondukata en la malproksima oriento milito inter la ĥinoj kaj japanoj pro Koreujo.

Japanujo trovas sin en tia sama fazo de societa disvolviĝo, en kiu sin trovas niaj Eŭropaj regnoj kun konstitucia maniero de regado. La konatiĝo kun la Eŭropa civilizacio ne povis ne influi sur la influeblajn japanojn. La ĉiam pli kaj pli kreskanta konscio de la libereco de homo ne povis ne alkonduki la japanojn al tio, ke ili konfesis la pli grandan racionalecon de tiu societa aranĝo, kiu estis ĉe la Eŭropanoj. Tiu alta instruo de amo kaj frateco al ĉio vivanta, je kiu sin tenas la mondo Eŭropa, ne povis ne resoni en la animoj de la japanoj, kiuj estis preparitaj al ĝi per la instruo de kompato de Buddo. Kaj tiel same kiel fermentilo, ĵetita en vazon kun pasto, kaŭzas tie fermentadon, kaj kvankam oni ĵetas ĉiam pli da pasto, la fermentilo levas kaj elpuŝas ĝin el la vazo, — tiel ankaŭ la fermentilo de nova rilato al la homoj kaj al la mondo, ĉiam pli kaj pli disvastiĝante kaj ekregante la kapojn de la

japanoj, devigis ŝanĝi tiun premantan rilaton de la riĉaj kaj regantaj klasoj al la popolo, kiu estis ĉe ili ĝis tiam. Ĉe la nova rigardado de la vivo fariĝis kompreneble, ke la kruda maniero de sklavigado de homoj per forto kaj per kredigado al ili, ke unuj homoj estas sklavoj kaj aliaj estas sinjoroj, estas jam ne ebla. Al ĉiuj homoj, kiel al la sinjoroj, tiel ankaŭ al la sklavoj fariĝis ĉiam pli kaj pli klara la konscio pri la libereco de la persono. Kaj la fortaj kaj riĉaj komprenis, ke oni devas elpensi ion pli ruzan.

Kaj tiujn ĉi rimedojn oni trovas. La forta kaj riĉa japana malplimulto decidas haltigi la konscion de la homoj, kiujn ili sklavigas, per tio, ke ĝi invitas ilin mem partopreni en la regado de la regno. La popolo estas alvokata, ke ĝi estu mem sia leĝdonanto. Kaj oni donas al la popolo konstitucion kaj parlamentan manieron de regado.

La popolo sub la premo de la militistaro kaj de la oficistoj el la regantaj kaj riĉaj klasoj elektas kvazaŭ siajn reprezentantojn en la parlamenton, kiuj kvazaŭ zorgados pri ĝia sorto. La vekiĝinta en la popolo konscio de sia libereco surdiĝas por kelka tempo per la ekstera apero de la libereco; la popolo estas trompita kaj sklavigita, sed elportas sian sklavecon kompare facile, ĉar ĝi ankoraŭ ne komprenis la trompon. Ĝiaj reprezentantoj trakondukas leĝojn pezajn kaj tenantajn ĝin en servanteco, kaj ĉio iras glate kaj trankvile.

Sed la fermentilo sin levas. La libereco kaj konscio de siaj societaj rajtoj komencas paroli, kaj kvankam la trompo

ne estas tute komprenebla, sed la tempo kaj inercio de la fariĝoj kaŭzas tion, ke la plimulto komencas batali kun la malplimulto sidanta sur ĝi per la montrita al ĝi maniero en la parlamento.

La popolo atingas tion, ke en la parlamenton komencas eniradi ne ŝajnaj, sed efektivaj ĝiaj reprezentantoj. Tiuj ĉi reprezentantoj komencas protestadi kontraŭ tiuj leĝoj, kiuj premadis la popolon, kaj postulas, ke oni delasu tiun ŝraŭbon, per kiu teniĝas la premilo de la regantaj oficistaj kaj riĉaj klasoj. Ĉiam pli kaj pli forta fariĝas tiu ĉi protestado, kaj ĉiam pli danĝera fariĝas la situacio de la regantaj kaj riĉaj klasoj, kiuj posedas la potencon.

Kaj jen en la komenco de la jaro 1894 en Japanujo havas lokon fariĝoj mirindaj en landoj konstituciaj. Ĉe la malfermo de la okupoj de la parlamento montriĝas, ke en ĝi la opozicio prezentas la plimulton kaj la registaro ne povas trakonduki siajn leĝojn. La parlamento estas dislasata, kaj kolektiĝas nova parlamento, sed montriĝas, ke ankaŭ en la nova la plimulto estas kontraŭ la registaro. Ankaŭ tiu ĉi parlamento estas dislasata, kolektiĝas nova, kaj en la nova montriĝas tio sama, kio en la malnova, kaj la nova estas dislasata. Kaj en tia maniero oni elektas kvinan parlamenton, kaj oni sentas, ke ankaŭ en la kvina parlamento estos opozicio, kaj la registaro komprenas, ke konduki plu tiun ĉi ludon estas neeble.

La trompo estas komprenita de la popolo, kaj oni bezonas entrepreni iajn rimedojn, kiuj deturnus la atenton de la popolo de tiu demando, kiu okupas ĝin en la donita momento kaj kiun ĝi komencas kompreni. Por tio oni uzas tian saman rimedon, kiu estas uzata por, ne batante infanon, kiu ne deziras plenumi nian volon, devigi ĝin plenumi tiun ĉi volon. La plej simpla rimedo, kiun uzas spertaj infanistinoj kaj edukantoj, konsistas en tio, ke, montrinte ian eksteran aperon, oni deturnu la atenton de la infano. Oni frapas, bruas, timigas per teruraĵo, kaj la infano, distrita per la nova apero, forgesas tion, kion ĝi persistis, kaj faras tion, kion oni deziris de ĝi. Kaj tia “teruraĵo” por Japanujo aperis en Koreujo.

II

Koreujo, “lando de la matena lumo”, vivis trankvile apartigite, ĝuis benitan klimaton, estis regata de reĝo, kiun ĝi rigardis kiel dian, estis premata de nobeloj kaj milituloj kaj rigardis ilin se ne kiel diajn, en ĉia okazo kiel proksimaĵo al tio ĉi. Tiel, renkontante nobelojn kaj precipe militulojn, aliaj klasoj devas mallevi la okulojn kaj la rajdantoj devas sin levi de siaj ĉevaloj. Oni adoris Buddon kaj Konfucion, ne komprenante ilian instruon kaj senplende subtenante la pastraron kaj rigardante kun amo kaj estimo al Ĥinujo, el kie oni ricevis sian religion. Oni ne lasis al si alilandanojn, sentante instinkte, ke tiuj povas detrui ilian

feliĉan ordon.

Kaj tiel Koreujo vivis ĝis 1866. En tiu ĉi jaro la rusoj ekprovis komenci interkomunikiĝojn kun Koreujo, sed tio ĉi ne prosperis: ĉar en tiu ĉi tempo en Koreujo komenciĝis kruela persekutado de kristanoj. Tamen en la jaro 1876 al la japanoj prosperis atingi ĉe Koreujo la malfermon de 3 maraj urboj por la japanoj, kaj en 1885 al la rusoj prosperis akiri eĉ la permeson komercadi en la ĉefurbo de la regno — Seul. Kaj post la japanoj kaj rusoj komencis penetradi ankaŭ aliaj Eŭropanoj kaj komencis mastrumadi kaj ekspluatadi la loĝantaron kaj konsumadi ĝiajn sen tio malgrandajn fortojn, konsumitajn en la plej alta grado de ĝiaj propraj mastroj. Tio ĉi ne povis ne indignigi la popolon, kiu nur en tio ĉi vidis la kaŭzon de siaj mizeroj, kaj la popolo ribelis, kaj komenciĝis buĉado de la nediaj arogantaj kulpuloj de tiu ĉi premado — la Eŭropanoj kaj japanoj. Tiu ĉi buĉado estis tiom pli sukcesa, ke la propraj mastroj rigardadis tion ĉi favore, ĉar tio ĉi deturnis la atenton de la popolo de la vera kaŭzo de ĝiaj mizeroj: despoteco kaj premado de la flanko de ĝiaj mastroj. Sed tiu ĉi buĉado nur donis pretekston al la ruzaj kaj lertaj batitoj elmeti siajn “leĝajn” postulojn, ke ilia sendanĝereco estu garantiata por la estonta tempo. Japanujo kaj Ĥinujo ekpostulis de Koreujo, ke ĝi bavu konstantan militistaron por tiu ĉi certigo de sendanĝereco por la ĥinoj kaj japanoj.

Kaj jen nun, kiam en Koreujo denove komenciĝis

malordoj kaj kiam la reĝo de Koreujo petis la imperiestron de Ĥinujo alsendi militistaron por kvietigo de la popolamaso, Japanujo ekrememoris siajn kontraktojn, kaj ĉar ĝi mastrumis en Koreujo kune kun Ĥinujo, ĝi ekvidis en tio ĉi “intrigojn” de Ĥinujo kaj postulis, ke ankaŭ al ĝi estu donita la rajto administradi en Koreujo kune kun Ĥinujo. Koreujo estis bongusta peco, kiun ekposedi por ĉiu estus oportune. Sed ankaŭ Ĥinujo tion ĉi komprenis, kaj anstataŭ respondo ĝi, por la certigo de “siaj” rajtoj, sendas en sian kvazaŭ vasalan regnon 12 000 da militistaro kun ordono en okazo de bezono “elĵeti for la peston-japanojn”. La kultura Japanujo kun alte disvolvita nacia sento estis kruele ofendita. Kaj la popolo devis forlavi la ofendon faritan al ĝi. Okazis ĝuste tio, kion la japanoj bezonis. Nun ĉiuj iliaj internaj aferoj devis esti forŝovitaj sur “postan planon” kaj la tuta atento devis koncentriĝi sur la ofendo, kiun la “putra regno” faris al la “kultura popolo”.

La “teruraĵo” estis trovita, restis nur konvinki kaj montri, kiel kruele la nacio estis ofendita, kaj entiri la popolon en tiun aferon, kiu estis tute fremda al ĝi.

Kaj jen la malplimulto komencas labori. Al la nova parlamento oni priskribas per helaj koloroj la preferojn de la politika potenco de Japanujo, oni komparas Japanujon kun la potencaj civilizitaj Eŭropaj regnoj, oni pentras per helaj koloroj la danĝeron de najbareco kun Rusujo kaj la Unuigitaj Ŝtatoj de Ameriko, la oportunecon de la posedado

de Koreujo. Oni priskribas la necesecon veni kun helpo al la premataj Koreoj, doni al ili tiun perfektan regnan aranĝon, kiun nun ĝuas Japanujo, kaj la neeblecon por tiaj civilizitaj homoj, kiel la japanoj, ne enmiksi sin en tian teruran malluman regnon. Kaj sub la hipnotiza influo de la oratora arto kaj de la tuŝita memamo estas atingata tio, ke la parlamento unuiĝis kun la registaro.

Restas trompi kaj klini al sia flanko la popolon, tiun forton, kiun oni bezonas ligi kaj kiun oni bezonas uzi. Sed fari tion ĉi estas ne tre facile kaj je la unua rigardo eĉ ne eble. Fari mortigojn kaj oferi sian vivon devas la popolo kaj nur la popolo sola, kaj por la trompo oni bezonas elpensi pli ruzajn rimedojn. Oni devas influi sur tion, kio por la popolo estas la fundamento de la vivo. Kaj tia fundamento, tia senco de la vivo estas por ĝi — la religio.

Kaj jen kun helpo al la malplimulto venas la religio kaj ĝiaj reprezentantoj. Ili cetere ĉiam helpadis. De la plej frua infaneco la pastraro kutimigadis la popolon obei tion, kion kvazaŭ postulas la religio, kaj de la infaneco la pastraro trompadis ĝin subŝovante al ĝi anstataŭ vera religio tiun, kiu estas oportuna por tiuj, kiuj uzas la sklavan laboron de la popolo kaj kvazaŭ zorgas pri ĝia klerigado. Kaj jen fariĝas afero, kiu ŝajnis ne ebla: malgraŭ ke la japanoj konfesas religion de amo kaj kompatato, kia postulas ne sole ne mortigi homojn, sed kompati, ami kaj ne senvivigi kian ajn el la vivaj eksistaĵoj, kiu postulas, ke en pluva tempo de

la jaro, kiam precipe multiĝas la malpli altaj vivaj ekzistaĵoj, oni eĉ ne iradu, por per tio ne senvivigi tiujn ekzistaĵojn, — jen oni atingas tian perfektecon de trompado ke prosperas kredigi la popolon, ke la entreprenita afero de milito, afero terura, malboma, — ke tiu afero estas sankta kaj postulata de tiuj religiaj leĝoj, kiujn konfesas la popolo. Kaj por kredigi je tio ĉi la popolon, oni skribas en la gazetoj artikolojn, kiuj konfirman tiun ĉi trompon, kaj la riĉaj kaj kulturaj klasoj per sia ekzemplo montras, kiel profunde ili komprenas la ofendon, faritan al la nacio. Ili kolektas per subskribo 80 milionojn kaj donas ilin prunte sen procentoj al la registaro por la sankta afero — milito kun la “putra malluma regno”.

Entiriĝas en tiun ĉi aferon ankaŭ la virinoj, ĉar ili sentas instinkte, kian graudegan signifon ili havas por tiu ĉi trompo. La virinoj kun entuziasmo iras en la militistaron kiel fratinoj kompataj, kaj por instrui ilin flegi la vunditajn, oni malfermas medicinajn leraĵojn en Tokio, kie ilin rapide instruas flegi vunditajn la instruituloj, kiuj dediĉis sian vivon al la bono de la homoj. La virinoj entuziasmigas por la granda afero siajn edzojn kaj filojn. La pastraro predikas en la preĝejoj. Sed ankaŭ tio ĉi estas ankoraŭ ne sufiĉa: oni devas inspiri kuraĝon por afero, kontraŭ kiu indignas ia konscienco de ĉiu, oni devas forpremi la riproĉojn de la konscienco, — kaj jen por tio ĉi plej alta eklezia persono de la Budda hierarĥio en Japanujo iras al la militistaro, por

entuziasmigi ilin por la buĉado, kaj li kondukas kun si standardojn, sub kiuj ili devas batali kaj per kies vido ili devas ĉerpi kuraĝon. Kaj sur tiuj ĉi standardoj estas skribita devizo, kiu devas doni karaĝecon por la buĉado, kaj por tiu ĉi devizo oni elektis: “Nama amida Bussu” — mi adoras vin, ho, eterna Buddo. Kaj la soldatoj, entuziasmigitaj de la ĉefepiskopo, rigardante kun kortuŝiteco la donitan al ili standardon, kun krioj de ĝojo forŝipiĝas Ĥinujon.

Kaj komenciĝas milito, komenciĝas tio, kiou bezonis la japana registaro por tiu malfacila “konstitucia” momento, en kiu ĝi sin trovis.

III

La sciigoj, kiuj alvenas al ni, estas tre ne precizaj, ĉar ambaŭ flankoj uzas ĉiajn eblajn penojn, por kaŝi la verajn rezultatojn de la bataloj, kaj tial estae malfacile doni kiajn ajn ciferojn, kiuj ilustrus la militon, Oni povas diri nur tion, ke ankaŭ laŭ la sciigoj, kiuj venas al ni, tiu ĉi milito eetas kondukata kun ne malpli granda krueleco, ol la militoj Eŭropaj. Oni scias, ke la japanoj, nacio impresebla kaj vigla, profitis de sia konateco kun Eŭropo kaj ne sole prenis de ĝi perfektigitajn ilojn de batalado, sed ankaŭ la perfektigitan ili multe perfektigis.

La komenco de la milito signiŝis per tio, ke la japanoj dronigis ĥinan transporton, ĉe kio la japanoj dronigia ŝipon kun 1500 ĥinaj Soldatoj, kaj nur 40 homojn savis la francoj.

Poste sekvis teraj bataloj apud Jag-San kaj Vi-Ĉu en Julio, en kiuj la nombro de la mortigitoj estis ĉirkaŭ milo. En la bataloj apud Ping-Jang en tri tagoj estis mortigitaj ĉirkaŭ 9000 japanoj kaj kelkaj centoj da ĥinoj. En la maraj bataloj apud Jalu kaj Port Artur (en la mezo de Septembro) ĉe la ĥinoj eatis disbatita unu krozisto, unu estis eksplodigita kaj tri dronigitaj; estis mortigitaj kaj dronis ĉirkaŭ 1700 homoj; kaj apud Port-Artur estis fermitaj 12 ĥinaj ŝipoj, kiuj devas esti eksplodigitaj en okazo de preno de la fortikaĵo. La ĥinaj ŝipoj sursaltas sur siajn proprajn minuojn kaj eksplodas kun la tuta ŝipanaro.

Sed tio ĉi estas la komenco. Oni ne estas ankoraŭ plene malsobrigitaj. Sed plue la homoj komencas bestigi. La ĥina gubernatoro de la insulo Formozo publikigas proklamacion, en kiu li anoncas normon de pagoj por mortigoj: por dronigita japana milita ŝipo 25 000 frankoj, por ŝipo ordinara 1250 fr., por kapo de japana oficiro 750 fr., de soldato — 375 fr.

Ĉe la batalo apud Port-Artur montriĝas, ke multaj kaptitaj japanoj estas senkapigitaj, aliaj — kripligitaj. La japanoj prenas la urbon, enfluegas en ĝin kaj faras komunan buĉadon kaj mortigas preskaŭ ĉiujn loĝantojn. Kelkaj ĥinaj soldatoj kaj komercistoj, kiuj savis sin en la maron, estas persekutataj per minoŝipetoj kaj dispafataj («*Times*», «*Rus. Vjedom.*» n-ro 319). Multaj ĥinaj kaptitoj estis senvestigitaj kaj mortpafitaj; al kelkaj oni fendis la ventrojn, aliajn oni

dismembris. Kaj por sia pravigo la japanoj konfirmas, ke la loĝantoj de Port-Artur partoprenis en la batalo kaj pafis el la domoj, kaj por tio oni bezonis ilin ekstermi. La ministro de aferoj eksteraj esprimas miron kaj bedaŭron pro tiuj ĉi sciigoj, anoncante, ke simila krueleco estas tute ne ebla ĉe la bonkoraj japanoj kaj ke la registaro decidis subteni la principojn de civilizacio kaj homeco («*Rus. Vjed.*» n-ro 323).

Kvankam la supre elkalkulitaj perdoj ŝajnas malgrandaj al ni, Eŭropanoj, kiuj kutimis al tio, ke en niaj bataloj oni mortigas en kelke da tagoj dekojn da miloj da homoj; sed oni devas rigardi ilin rilate al tiu nombro da soldatoj, kiuj konsistigas la militistarojn de la ĥinoj kaj japanoj en Koreujo. Kaj tiuj ĉi militistaroj prezentas nur dekojn da miloj, ĉar en la tuta sumo Japanujo havas en paca tempo 74 000 soldatojn kaj en tempo milita — 230 000. La perdojn akompanas la ordinaraj mizeroj, kiuj sekvas militon kaj kiujn prezenti per ciferoj estas ne eble. Tiuj ĉi mizeroj estas: malsanoj en la militistaro (la japanoj, ne kutimintaj je la nesana klimato de Koreujo, suferas kaj mortas de disenterio, kaj la malvivuloj, ne forprenitaj de la kampo de batalo kaj putrantaj, ankoraŭ pli infektas la jam sen tio malsanigan aeron), manko de provizoj kaj malsato en la militistaro kaj en la tuta lando, kie siaj propraj pasantaj soldataroj rabas kaj ruinigas ĉion, pesto, kiel ekzemple en la provincoj Ton, Kong kaj Kanton, superforta pezo de

depagoj, ribeloj, kiuj ekflamas en diversaj lokoj de la tuta lando dank' al tio, ke la atento de la registaro estas detirita, ekzekutoj, novaj forpreno de freŝaj junaj fortoj por plenigado kaj pligrandigado de la militistaro, k. t. p.

Kaj tiu ĉi milito denove por longe detiros la atenton de la popolo de tio, kion ĝi komencis kompreni, denove bestigos ĝin, ankoraŭ pli forprokrastos la venon de tio, kio farus ĉiujn homojn fratoj.

IV

Kiel do rigardas ĉion tion ĉi la Eŭropa publika opinio ? Ĉu ĝi vidas en la fariĝoj, kiuj havas lokon en la oriento, respeguliĝon de ĉio, tio, kio povas esti morgaŭ-postmorgaŭ ĉe ni? Ĉu la gazetaro malfermas al la popolo la okulojn sur tiun tutan teruron de la milito, kiu nun estas kondukata kaj kiu en ĉiu momento povas malfermiĝi ankaŭ ĉe ni ?

Jes, la Eŭropa publika opinio sekvas kun febra intereso la fariĝojn, sed ĝi ne stariĝas sur tiun solan necesan punkton de vidado, de kiu oni devas rigardi tiun ĉi buĉadon. Oni montras la seriozecon de la venkoj de la japanoj, oni esprimas konsenton al la kultura progreso de la japanoj kaj al ilia konstitucia maniero de regado (precipe la gazetoj «*Central News*», «*Standart*», «*Daily News*», «*Times*», «*Kölnische Zeitung*»), oni montras la proksimecon kaj solidarecon de la interesoj de Japanujo kun la Eŭropaj regnoj kaj la necescon subteni Japanujon. Oni priparolas

la demandon, ke al la angloj estas tre oportune okupi denove tiun porton Hamilton, kiun ili iam posedis kaj kiun oni deprenis de ili en la jaro 1878 («*National Zeitung*») — Oni parolas pri tio, ke estus krimo kontraŭ la civilizacio doni helpon al Ĥinujo, kiu “malestimas alilandanojn kaj persekutas Eŭropanojn”, ĉar tia helpo signifus esprimi malkunsenton al la civilizitaj kaj irantaj laŭ la postesignoj de Eŭropo japanoj («*Vossische Zeitung*»).

Oni prijuĝas la politikan rilaton de Rusujo al la ekflamiĝinta milito, kaj unuj suspektas ĝin je profitamaj intencoj, aliaj laŭdas ĝin pro ĝia neprofitemeco («*Politische Korrespondenz*» kaj «*Republique Francaise*»). Oni priparolas kun la plej serioza kaj instruita mieno la organizacion de la militiataro, la sistemon de la pafiloj, pafilegoj k. t. p. Oni suspektas ĉiujn aliajn regnojn, krom tiu, al kiu apartenas la gazeto, je la deziro varmigi la manojn ĉe la fremda milito kaj alkapti por si ian oportunan pecon, kaj sur tiu ĉi temo oni konstruas kaj pripensas ĉiajn eblajn kombinaĵojn, oni elpensas por tiu ĉi celo (se oni povas kredi al la Parizaj gazetoj) spritan “protokolon de neprofitemeco”, laŭ kiu la regnoj, kiuj ĝin subskribis, prenas sur sin la obligon deteni sin de teritoriaj akiroj en la oriento kaj dividi kun aliaj tiun oportunan en komerca rilato situacion, kiun ĉiu tie akiris. Oni priskribas la terurojn de la ekzekutoj de tiu ĉi kvazaŭ barbara kaj sovaĝa popolo — la ĥinoj...

Kaj ĉion tion ĉi oni faras tre serioze kaj pensas ĉe tio, ke oni okupas sin je tiu sama afero, kiu estas bezona kaj grava. Kaj la publiko legas kaj priparolas laŭ la donita al ĝi temo, kiel ĥoro kantas laŭ la sono, donita per la diapazono de la direktanto. La publiko traktas kiel hipnotizita pri ĉio, nur ne pri tio, pri kio oni devas trakti.

Tio ĉi estas simila al tio, kiel se al brulo, en kiu pereas homoj kaj havo, per kiu ili vivis, kaj kiu tuj etendos sin sur la konstruaĵojn najbarajn, kolektiĝis homoj kaj staras kaj ne povas elkonsideri, kion ili devas fari. Kaj jen ĉe tiuj ĉi homoj aperas gvidantoj, kiuj komencas priparoladi, ke brulas la tegmento, ĉar ĝi estas ligna kaj ne el fajreltena materialo, ke se la scienco estus ĉie disvastigita, tio ĉi ne okazus; parolas pri tio, ke jen la najbaroj faris tiajn kaj tiajn aranĝojn kaj fondis tian kaj tian fajrosavistaron, kaj ke la fajrosavistaro estas direktata tiel kaj tiel kaj havas tian kaj tian vaporan pumpilon; kaj jen la homoj ekinteresiĝas per la pumpilo, fajrosavistaro, ĝia regularo, kaj ili komencas efektive serioze kaj detale priparoladi tiun ĉi demandon kaj eldiras pri tiu ĉi demando multe da efektive seriozaj kaj saĝaj konsideroj; fariĝas viva interŝanĝo de pensoj, disputo... Kaj la domo dume forbrulis, kaj forbrulis la homoj, forbrulis la havo, pereis ĉio, kion oni povis ankoraŭ savi, pereis la plej kara, kion oni ne povas jam revenigi — vivo de homoj.

Oni forlasis la plej gravan, la esencon, kaj oni

konsideradis pri ne tiel grava, pri neĉefa, kaj oni perdis por tio ĉi multe da fortoj kaj saĝo kaj oni ne atingis tion, kion oni devis atingi en kvin minutoj.

Tiel ankaŭ en la nuna okazo. Antaŭ ni fariĝas tiu teruraĵo, kiu morgaŭ-postmorgaŭ povas fariĝi en Eŭropo, kaj ni kiel infanoj prijuĝas tion, kio por ni ne estas grava nek bezona, kaj ni permesas al tiu ĉi teruraĵo nerimarkite disvolviĝi, penetri kaj ataki nin.

La komenciĝinta bestigo videble malesperigas la plej sentantajn ĥinojn, kiujn oni devigis partopreni en la milito, kaj jen en la ĥina militistaro komenciĝas memmortigoj. Tiaj elmontriĝoj de bestigo kredeble ne povis ne konfuzi iom ankaŭ la civilizistojn mem, la japanojn, kiel oni povas vidi el la ordono de la japana ministro de milito, kiu videble transskribas laŭvorte similajn ordonojn Eŭropajn: “Kiel ajn kruelaj kaj venĝemaj la ĥinaj soldatoj estus, oni devas agi kun ili konforme al la komunaj postuloj de la moralo. Kun la malamikaj vunditoj kaj kaptitoj oni devas sin teni mole kaj zorgeme. Tiel oni devas agadi ne sole kun la vunditoj kaj malsanuloj, sed ankaŭ kun ĉiuj ĥinoj, kiuj ne kontraŭstaras al niaj bataliloj. Estimon oni devas montri eĉ rilate la korpon de mortinta malamiko. Ni estas ravataj de la maniero de agado de la okcident-Eŭropaj regnoj, kiuj faras al la kaptitaj generaloj la decantajn al ili honorojn. La japanaj soldatoj devas ĉiam memori la bonecon do sia reĝo kaj montri tiom same da kuraĝo kiom ankaŭ da kompato.”

V

Tio ĉi estas efektive ekzempla peco el tio, kion ni faras en niaj aferoj. Ankaŭ tie ĉi estas kontraŭparolo ĉie kaj en ĉio. Oni ne povas konformigi sin al la postuloj de la moralo, kiam oni faras aferon malmoralan kaj pensas, ke ĝi estas ĝusta. Unu esceptas la duan. Oni ne povas elmontri tiom same da kompato kiom da milita kuraĝo, ĉar unu esceptas la duan. Oni ne povas konfesi instruon de amo kaj kompato kaj fari agojn de malboneco kaj krueleco, ĉar unu esceptas la duan.

Kaj se oni povas tiel agi, oni devas scii kaj konstante konscii, ke ni estas rabistoj kaj ne tiuj homoj, kiuj ni devus esti laŭ niaj vortoj kaj laŭ la instruoj, kiujn ni konfesas.

Ni vidas pentraĵon de ekzekuto kun sango kaj suferoj kaj ni sincere indignas kaj kompatas, ne konsciante, ke ni ankaŭ tion ĉi faras.

Kaj la ĥinoj kaj japanoj faras aferojn kontraŭajn al tio, kio unuigas la homojn en unu familion, kaj ni tion ĉi vidas kaj ni klarigas al ni tion ĉi per tio, ke la instruo, kiun ili konfesas, ilia religio, estas malpli alta ol nia, kaj ni trankvile faras aferojn pli malbonajn.

Ekzistas rusa proverbo: “fremdan mizeron ni disbatas per manoj, en propra mizero ni estas infanoj.” Kaj tio ĉi estas ĝusta. Kiam la pasioj ekludas, tiam estas malfacile

teni sin objektive al tio, al kio ni tenas nin pasie. Kaj tial, kondukante niajn aferojn, ni kontraŭvole forlogiĝas per tio, per kio oni ne devas forlogiĝi, kaj ni faras pli malbone.

Sed jen estas antaŭ ni nia propra situacio, sed prezentanta sin al ni kiel aera repentiĝo. Kaj ni povas trankvile rigardadi ĝin kaj trankvile, objektive prijuĝi tiujn teruraĵojn kaj klarigi kaj kompreni la radikon de tiu teruraĵo. Ni povas tion ĉi fari tiom pli ĝuste, ke ni ĉiuj estas kristanoj, kiuj konfesas la plej altan en la mondo instruon de amo kaj kompatato, instruon dian. Kaj tial ni devas prijuĝi ne la flankajn negravajn punktojn de la afero, sed tion, per kies esploro ni akiris abomenon al ripeto de tia kaj eble ankoraŭ pli malbona buĉado ĉe ni.

Ni devas kompreni, ke ankaŭ ĉe niaj registaroj ĉiam troviĝos malproksimaj Madagaskaroj, fratoj-slavoj, Kongoj k. t. p. k. t. p., por deturni kaj delogi la popolon tiam, kiam ili tion bezonos.

Kaj tiel same kiel ni, konsumitaj per neŭrasteno, sekvas la konsilon de kuracisto kaj ne trinkas alkoholaĵon, por ke la alkoholo ne devigu nin fari agojn kontraŭajn al nia prudento kaj nia konscienco, tiel same ni devas ankaŭ gardi nin de tiu ĉi terura alkoholo de milito, kiu bestigos kaj malmoraligos nin kaj devigos nin fari tiajn agojn, kiuj ankoraŭ por multe da jaroj surdigos nian prudenton kaj nian konsciencon.

(laŭ skanaĵo korektis **Haicjo**)

— *Esperantisto* 3/1895

Tri Tagoj sub Liao-Yang

(L' impesoj de la kuracisto)

20

Alveninte Liao-Yang'on en mezo de aŭgusto, mi estis mirigita de la trankvileco, kiu ĉirkaŭregis. Ŝajnis, ke la malsobriganta dorloto de suda nokto disigis la sangajn fantomojn kaj alporlis kun si mallaŭtecon kaj pacon kaj tiom oni ne volis kredi, tiom estis nekomprenebla la penso, ke post kelkaj horoj sur tiuj ĉi kampoj, plenigitaj je aromato, disverŝiĝos en larĝa rivero, la sango de tiuj, kiuj en tiu ĉi nokto ankoraŭ kredis kaj esperis, vivis kaj revis. La 16-an de aŭgusto, malgraŭ la obstinaj diroj pri foriro de japanoj suden, ĉio sin preparadis al sangoverŝa batalo. Jam de la mateno estis aŭdata disrulema sonego de centoj de bataliloj kaj sur la supraĵoj de altaj montetoj, ĉirkaŭantaj Liao-Yang'on el sudo kaj oriento, ni rimarkis blankajn nubetojn de rompiĝantaj ŝrapneloj. La moviĝo en Liao-Yang'o kreskiĝadis, l' atmosfero fariĝadis ĉiam pli streĉiĝema. Ĉio haltetis, atendante ion malordinare minacan kaj majestan: en l' aero varmigita de l' brulantaj radioj de l' tropika suno, flugadis jam la spiro de l' morto; estis sufoke, peze. Kaj la batalo en la ĉirkaŭaĵoj de Liao-Yang'o ekflamadis; la japanoj premadis niajn poziciojn kun terura forto, rapide alkaptante unu vilaĝon post alia kaj depelante nin al la ĉefa linio de l' Liao-Yang'aj fortikaĵoj.

Nia bandaĝa punkto, sin trovinta okcidente de l' relaro

fervoja, ĉe la suda semaforo, prezentadis pentraĵon de vivema agado. Vunditoj ĉiam alvenadis. Jen oni alportis generalon R. Bombo de artileria batalilo malhavigis la malfeliĉan generalon je ambaŭ okuloj tiatempe, kiam li, opiniante sin sendanĝera ĉe la fundamento de monteto, sufiĉe malproksima for de l' batalejo, tagmanĝadis kun sia adjutanto. Oni alportis al ni ankaŭ generalon M., grave vunditan de grenado. Nia tento savi lin per amputacio ne sukcesis; li perdis tro da sango kaj mortis dum la operacio. Vespere la kvanto da vunditoj estis jam tiel granda, ke oni devis pro neesto de loko en kovrita konstruaĵo dismetadi ilin en la korto sub la ĉielo mem; inter la vundoj plejis faritaj de ŝrapneloj.

Dume la batalado ĉesis kaj super Liao-Yang'o malsupriĝis nokto, delikata, stela, plena je misteraĵoj, nokto, naskinta teruran tagon.

En la urbo oni faris la bataliloj, kunkondukiĝadis la rezervoj, estis difinitaj la bandaĝejoj, preparataj la bandaĝaĵoj. Brue resonadis en nokta trankvileco la fraparo de l' pezaj ŝarĝaj kestoj kaj la piedfrapado de lokŝanĝanta ĉevalaro. Ifoje per malfavora lumo ekbruladis sur horizonto fajreto, sed tuj malaperadis en nokta mallumeco. Estis tiel mallaŭte, tiel senmove, tiel trankvile ke, ŝajnis tiu ĉi nokto ne havos finon.

Lacigita de la laboro, mi kuŝiĝis por ripozi kaj tuj feliĉe kaj forte ekdormis. Ne pasis eĉ tri horoj, kiel terura

batala bruego min vekis. Vekiĝis ankaŭ la kolegoj. Mi eliris eksteren. La matena ĉielruĝeco malaperadis kaj post alta ĉeno de Liao-Yang'aj supraĵoj montriĝis la fajra rondo de l' suno. La ĝenerala batalado komenciĝis. Kiel antaŭe, la japanoj ekbatalis ĉe l' unuaj radioj de l' leviĝanta suno. La bruego ĉiam plifortiĝadis. Sonegis du miloj da bataliloj oriente kaj sude kaj ilia sono kunmiksiĝadis en senĉesan bruon, en kiu estis malfacile distingeblaj apartaj pafoj. Post duonhoro jam oni ne povis vidi la montetajn supraĵojn; ili estis kovretitaj de blankaj nuboj de rompiĝantaj ŝrapneleĵ; ialoke, alte en aero leviĝadis kolono da nigra fumo de l' japana ŝimozo; odoris sufoka brulaĵo. Je sepa horo de mateno nia bandaĝejo iĝis en la sfero de l' artileria pafado kaj oni al ni rapide ordonis almoviĝi al stacidomo kaj dismetiĝi en ĝardeno, servinta kiel ordinara nia promenejo. Tie ĉi ni rapide aranĝis grandan tendon kaj preparis ĉion necesan por la bandaĝo. Apude sin metis la moveblaj malsanulejoj N^o 16, 2 kaj 26 kaj unu el la batalionoj de l' Ruĝa Kruco. Baldaŭ ekalvenis vunditoj. La batalado havis komence precipe artilerian karakteron. Ĉirkaŭ tria horo post tagmezo la steĉeco atingis ekstreman gradon. La bruego estis tiel forta, ke kelkafoje estis malfacile labori; la tero sonegis. Ŝajnis, ke de la ĉielo malleviĝis la titanoj kaj ke ili elradikigas tiujn ĉi montojn kun ilia fundamento.

Atendante eblan foriron de Liao-Yang'o oni ordonis evakuacii norden la vunditojn plej baldaŭ post bandaĝo.

Bedaŭrinde, tie ĉi. montriĝis la difektoj de l' organizacio, atingantaj kulpan malzorgemecon. En plej bezona momento la aranĝitaj sanitaraj vagonaroj okazis ne tie, kie oni ilin bezonis, sed apud Ĉita aŭ Ĥarbino.

Oni devis transporti grave vunditojn kun ventraj kaj kapaj vundoj en malakurate kunmetitajn el pakajaj vagonoj, provizore “sanitarajn” aŭ, pli rekte, antisanitarajn vagonarojn. Post, kiam mi mem devis konduki tian vagonaron, mi proprokule vidis ĉiujn belecojn de tia evakuacio. La vunditoj dismetiĝadis simple planken, matracoj, benkoj tute ne estis uzataj; kaj ankaŭ ne estas eble eĉ dum plena deziro el vagonoj, havantaj sur la muretoj surskribaĵon “8 ĉevaloj — 40 homoj” fari bandaĝejon almenaŭ ion oportunan. Kaj la malfeliĉaj vunditoj, bezonintaj absolutan trankvilecon. estis ĵetataj al ĉiuj suferoj de vojaĝo en pakaja vagonaro, pavimante la vojon el Liao-Yang ĝis Ĥarbin per siaj mortekorpoj: la krucoj super la tomboj de tiuj ĉi malfeliĉaj oferaĵoj al la milito sonados per eterna riproĉo al la homa konscienco.

Vesperige, post dekkvinhora kanonado, la batalado mallatigis. Sed en niaj tendoj la laboro energiis. Vunditoj enaperadis per senĉesa fluado kaj la neebleco ilin lasi en Liao-Yang igis nin labori febre-rapide; sed anstataŭe la laboro faciliĝis; post senĉesa taga sonego, kiam finiĝis la bruo kaj klopodado kutimaj en la unuaj batalhoroj, ni laŭ nia povo penis enkonduki certan sistemon en nian agadon

kaj nia afero tial plisukcesadis. La batalado daŭris tutan nokton. Pri dormo, pri ripozo oni eĉ ne pensis; ni ne havis tempon elsendi parton el vunditaro al vagonaro, kiam la bandaĝejo repleniĝadis kaj oni devis bandaĝi, bandaĝi malgraŭ laceco, neelportebla bezono ripozi, doloro kaj doloretaj en ĉiuj membroj.

Ĉe matenlumiĝo l' artileria batalado rekomenciĝis; kaj plej kulminacia punkto de tiu ĉi batalo estis la tempo inter kvina kaj sepa de vespero, kiam oka, helpante ĉirkaŭiron de Kuroki, kun terura forto atakis niajn sudajn poziciojn. Fine, disaperis timinda fulmotondro kaj io malordoinare majesta kaj mistera, estis en la konmiksiĝo de l' batalilara disbruo kun la sonado de l' tondro. Ŝajnis, ke ĉiuj naturelementoj sin armis kontraŭ la homo, ke la ĉielo mem sendas malbenojn al la sangigita tero.

Nia tendo estis ĉirkaŭverŝita per akvo kaj labori dum tiaj kondiĉoj senebliĝis. Niaj vunditoj malsekiĝis ĝis l' interno de l' ostoj: feliĉe, al nia dispono estis vino kaj tiaminute ĝi alportis al ni grandan utilon. Kiam la fulmotondro pasis, la ĝardeneto, kie estis dismetitaj la bandaĝaj lokoj, similis lagon, en kiu elrigardis kiel blankaj makulaj tendoj kun flago de l' Ruĝa Kruco. Kaj kiam mallumiĝis, rekomenciĝis la laboro, ĉar dum kelkaj horoj da energia batalado alkolektiĝis amaso da vunditaj, bandaĝinte, ni, kiel antaŭe, elsendadis ilin al vagonaroj, forveturantaj ĉiuhore norden; tiam oni montradis preferon

al gravaj vunditoj, kvankam en tiu ĉi grandega amaso ne ĉiam estis facile distingi la vundojn. Ĉirkaŭ 12-a horo de nokto mi aliris en la stacidomon por plifortiĝi. En la stacidomo estis amaso de malgrave vunditaj oficiroj, ĵus revenintaj de l' pozicioj; tie ĉi estis ankaŭ estroj de kelkaj batalionoj. Regis forta animeco; estis videble, ke en la fluo de l' batalado aperis ia ŝanĝo kaj se pri tio ĉi oni ne parolis difine, tamen ĝi estis sentata en la maltrankvilaj rigardoj de l' ĉeestantoj, kaj tiu ĉi antaŭsento baldaŭ veriĝis; ne pasis eĉ horduono, kiam venis sciigo pri tiom danĝera flanka ĉirkaŭiro de l' armeo de Kuroki. Mia konata centestro, reveninta de esplorado, demandita pri la stato de la aferoj, eldiris suface pesimisotan opinion; certe, la sorto de Liao-Yang estis en granda danĝero, kaj la proksimaj tagoj devis solvi la signifon de tiu ĉi rimarkinda batalado. Dume aperis antaŭsciigantoj de tuj el danĝero; reveninte al bandaĝejo, mi eksciis, ke generalo Trepov donis ordonon esti ĉiuminute preta al remove de l' bandaĝaj lokoj norden. Tial ni transdonis la gravajn vunditojn al Georga societo kaj ekpreparis nin al vojaĝo. Ĉio estis kunmetita, kaj la Liao-Yang'a ĝardeneto, kun kiu estas ligita por ni tiom da rememoraĵoj, malpleniĝis. Jam dislumiĝis; bruego ne aŭdiĝadis, estis trankvila aŭgusta mateno kaj ĉe l' unua rigardo oni povus pensi, ke la batalado ĉesis. Kredeble, nia transmovado estis kaŭzita per la reiro de niaj militistaroj for de la suda supraĵo kaj per la ebleco de ĉirkaŭpafado en

regiono de Liao-Yang'a stacidomo kaj relaro fervoja, ĉar la japanoj ĝin okupis.

Irante al Liao -Yang'a ponto, kie ni estis dismetiĝontaj, ni renkontis multajn piedirajn kolonojn — moviĝis militistaro renkonte al Kuroki. Alvenis la decida moment; la restintaj en Liao-Yang militistaroj okupis la fortikaĵojn, estis aŭdataj oftaj pafilaj frapoj kaj krioj.

La vagonaroj senĉese alportadis norden la vunditojn, administrantarojn; rapidis ankaŭ privatuloj; konkure okupante la vagonajn lokojn eĉ sur la poststarejoj vagonaj. Sed plej zorgeman vidon havis niaj “ĥodi” — ĥinoj, elkurintaj amase por rigardi la malkutiman scenon. Ili ankaŭ ekuzis la momenton kaj plialtigis nekredeble la produkajn prezojn; por pano mi pagis 60 kopekojn. Je 12-a horo de tago mi ricevis ordonon alveni stacidomon kaj konduki la vagonaron kun vunditoj Ĥarbinon. Terure lacigita, malsata, post tri sendormaj noktoj, mi ekĝojis tiun ĉi proponon kaj post duono da horo provizore sanitara vagonaro el “tepluŝki”¹ malrapide elveturigadis min el la historia Liao-Yang.

D-ro S. Epŝtejn.

— *Ruslanda Esperantisto* 2,3-4/1905

¹ “Tepluŝki” (Hojtojotoj) estas speciala rusa vorto, kiu signifas simplan komercaĵan vagonon, altaritan je la sanitaran kaj vintre hejtigatan.



Oni certe supozas, ke en Ĥinujo estas dialektoj tiel malsamaj kiel franca al angla; ke loĝantoj de urbo A bezonas tri-kvarjaran studadon de aliurba dialekto; ke estas erarkompreniĝo inter geedzoj, naskiĝintaj en malsamaj urbo; ke troviĝas grandega malhelpo por fremduloj, kiuj intencante ellerni ĥinan lingvon embarasite ŝanceliĝas elekti, kiu dialekto estas por ili bezona; ke ĥina vojaĝanto devas scii 10-20 lingvojn, ktp. Sed tiu hipotezo estas erara.

La ĥina lingvo diferenciĝas inter buŝa kaj skriba, sed la skriba tre influas la buŝan, tial la ĥinaj dialektoj pli malpli sekvas post la ĥina skribo, dum 2000 jaroj en sia ŝanĝiĝo.

La ĥina skriba lingvo estas ideografio. Ĝin elpensis saĝulo antaŭ 4000 jaroj. La primitiva formo tre similas la naturan figuron. Poste, por faciligi la skribadon, oni iom post iom aliigis ĝiajn elementojn. La nuna figuraro estas fiksita en sia formo jam antaŭ 2000 jaroj kaj restis senŝanĝa. Nordĥinaj personoj legas ĉiujn librojn kun sama kompreno kiel sudĥinoj, egale ĉu la libro eldoniĝas nove aŭ antikve. Dialekto ne troviĝas en ĥina verko, ĉar entute ĥina parolo ne estas redonata per la skribaĵo. Tial sama vortofiguro posedas malsamajn elparolojn ĉe la loĝantoj de diversaj

urboj malproksimaj unu de la alia. Jen la „dialektoj“ de Ĥinujo. Vere, tiaj dialektoj ekzistas multaj.

Ĉiu ĥina vortofiguro havas nur unu silabon, unu frazo konsistas el 2-3 aŭ pli da figuroj, t. e. silaboj. Ekzemple: ren (homo), ma (ĉevalo) ktp. Oni povas vidi, ke en ĉiu silabo troviĝas konsonanto(j) kaj vokalo. Ĝenerale en malsamaj dialektoj la konsonantoj estas samaj kaj nur la vokaloj ŝanĝiĝas. Cetere la ŝanĝiĝo de 1' vokaloj iras regule jaron post jaro, kaj de unu urbo al alia, tiel ke oni, prenante unu ekstremon, povas enmanigi la tutan serion. Tial estas facile ellerni ĉian dialekton. Lastatempe la tiel nomita „Ku ju“ disvastiĝas en Ĥinujo kiel Esperanto en la mondo. Ĝi estas artefarita serio da alfabetoj destinitaj por akordigi la dialektojn de Ĥinujo. Mi kredas, ke la malsameco de la ĥina buŝa lingvo malaperos dank' al la neceseco de 1' popola komunikado kaj natura evolucio de 1' homa lingvo.

La disvastiĝo de Esperanto estas la sama kaŭzo, kaj kompreneble ĝi ŝanceligos la malhelpon naskitan el la naciaj lingvoj kaj unuigos ia homaron tiel facile kiel la ĥina lingvo en Ĥinujo.

— *Verda Stelo* 1/1926



Ĥina Spirito

El germana lingvo trad. *Elisabelh Bünemann*

La kontrasto Konfucio — „racio ĉion ordiganta" kaj Laotse — „animo meditanta" ekvilibrigas Ĥinuĵon. Konfucio (551-a — 479-a antaŭ Kristo) estas la moralisto, la praktika politikisto, kiu donis al Ĥinuĵo ĝian patriarkan organizon de ŝtato kaj familio. (Oni devas finatendi, ĉu la revolucio de 1905-a, kiun iniciatis kelkaj en Ameriko edukiĝintaj ĥinaj intelektuloj kaj kiu estis tute malĥina, havos daŭran sukceson.) Laotse estas la mistikulo, enprofundiĝinta en sin mem, kiu volas doni nur moralan ekzemplon kaj nepre evitas ĉiun aktivan, devigan realigon de etikaj postuloj. Li estas la unua, kiu klare esprimas la pacifisman emon de la Ĥino. „Kiu per saĝo helpas la Sinjoron de la Mondo, ne subigas la mondon per bataliloj." Laotse naskiĝis en la jaro 604-a antaŭ Kr. Li administris la regnan arkivon de la dinastio Chou kaj verkis la Tao-teh-king², kies senco estas: la homo ne devas vivi eksteren, sed de interne. Kvankam la klimata influo sendube kunefikis je la ekesto de la „tao-isma" homo, tamen ŝajnas al mi, ke la

² Tao estas laŭ Laotse la plej alta potenco, la prakaŭzo de la fizika kaj etika mondo. King — eklezia libro, kanona libro

apartigita linio inter la orienta kaj okcidenta homo rekte tranĉas la animon de la homaro, kiu ekvilibras nur per la eterna leĝo de la kontraŭpezo, de la polareco, de la kontrasto inter tago kaj nokto, morto kaj vivo, dio kaj diablo, viro kaj virino, bono kaj malbono. La tipo de la orienta kaj okcidenta homo (oni povas nomi lin ankaŭ la homon de la (sun-) leviĝo kaj la homon de la (sun-) subiro) ekestas ĉie: en ĉiuj epokoj kaj popoloj kaj klimatoj. La faŭsta³ kaj la apolona, la sentimentala kaj la naŭva homo estas paralelaj polarecoj. La orienta penso, kiel Laotse ĝin pensas, estas mita, magia pensmaniero, pensado pro si mem. La okcidenta penso estas laŭracia, empiria pensmaniero, penso pri si mem, penso prilaca. La orienta homo bazas en si mem kaj havas sian celon nur en si mem. Lia mondo estas la interna mondo. La okcidenta homo estas „ekster si“. Lia mondo estas la ekstera mondo. La orienta homo kreas la mondon, la okcidenta difinas ĝin. La okcidentulo estas scienculo, la orientulo estas saĝulo, divenulo, sanktulo, esenculo, kiu „kaŝportas siajn juvelojn sub mizera vestaĵo. “La grandaj ĥinaj poetoj estas ĉiuj sub influo de Laotse, kiu en siaj sentencoj estas unu el la plej grandaj poet-filozofoj kiel Plato kaj Nietzsche. Liaj skolanoj Lie-dsi kaj Ĝuang-dsi pleje evoluigis la arton de la parabolo, kiu estas la arto, paroli samtempe kaj sammedie, per la samaj vortoj al

³ *Faŭsto — heroo de samtitola dramo de Goethe.*

homoj el tute diversaj regionoj. „La vera libro pri la neelĉerpebla fonto de la krea forto“ — ĝia aŭtoro estas Liedsi, „la vera libro pri la suda lando de la floroj“, ĝin verkis Ĝuang-dsi. Multaj el tiuj paraboloj reprezentas la plej belan kaj plej profundan en homa lingvo ĝis nun pensatan kaj esprimatan. Oni legu, oni revu la „papili-songon“ de Ĝuang-dsi: „Iam Ĝuang-ĝu songis, ke li estas papilio, flugvaganta papilio, kiu sin sentis treege agrabla kaj feliĉa kaj kiu nenion sciis pri Ĝuang-ĝu. Nun mi ne scias, ĉu Ĝuang-ĝu songis, ke li estas papilio, aŭ ĉu la papilio songis, ke ĝi estas Ĝuang-ĝu, kvankam certe estas diferenco inter Ĝuang-ĝu kaj papilio. Tiel efektiviĝas la metamorfozo de la objektoj.“

La ĥina literaturo estas tiom ampleksa kiom la granda ĥina regno mem. La plej antikva literatura dokumento estas surskribaĵo de la imperistro Jao, ĉirkaŭ el la jaro 2400-a antaŭ Kr., kiu ektuŝas la temon pri la superakvego. Jam en tiu epoko la ĥina kulturo havis siajn firmajn trajtojn, akiritajn nur per longdaŭra tradicio de jarmiloj. — En la dekoka jarcento iu imperiestro projektis la presigon de elektaĵoj el la klasika literaturo. Tiu elekto ampleksis 163000 volumojn, el kiuj ĝis 1818-a proksimume 80000 eldoniĝis. Ni konas nur etan parton de tiu literaturo. Verŝajne la Eŭropano povos fari ankoraŭ grandajn eltrovojn laŭ tiu rilato, kiuj eble ne estos malpli gravaj ol la eltrovo de Ameriko. Oni imagu, ke en la Munĥena ŝtata

Biblioteko troviĝas kolekto da ĉirkaŭ 10000 ĥinaj libroj, kiu ankoraŭ ne estas kataloge enregistrita.

La ĥina lingvo konsistas nur el unusilabaj vortoj, kiuj tute koncize sen interligo sekvas unu la alian. La substantivoj ne estas deklinaciataj, la verboj ne konjugaciataj:

Luno staras monto Brilo super arbaro. Malproksime fluto.

Hela silko. Knabino dancas.

Jen proksimume la fikcio de ĥina poemo, kun la escepto, ke la rimo mankas.

La ĥinaj poemoj estas rimhavaj. La vokalo, laŭ la nuanco de sia sono, donas sencon al la ĥina vorto. Unu vorto povas esti interpretata dudekoble. Skribita, ĝi varias ankoraŭ multe pli abunde, kvazaŭ floro. Alfabeto ne ekzistas. La skribo estas senlitera skribo. La skribsignoj vekas en la ĥina konscio, sen helpo de la sonoj, multkolorajn ideojn. Oni ekvidas signon — kaj pensas: funebro, malriĉeco, sankteco. Oni kumetas signojn. Ludeme. Oni konstruas mozaikon: okulo — akvo, signifas larmon. Senfinaj eblecoj por la poeto, kiu samtempe imagas, desegnas, formas kaj kantas sian poemon. Ĉiuj poemoj estas ankaŭ kantataj. Laŭ la Ĥino nur la lirika poeto estas vera poeto. Romanoj, noveloj kaj dramoj apartenas al la literaturo, sed ne al la poezio. Pro tio la aŭtoro de romanoj kaj dramoj ĝenerale rezignas pri sia subskribo kaj restas

anonima. La redakton de la antikva ĥina popolkantaro de Ŝi-king (500-a antaŭ Kr.) prizorgis Konfucio, kiu estas ankaŭ la aŭtoro de belega „epitafo por militisto”. La plej eminentaj pioniroj de la klasika ĥina epoko estas Kiu-juan (300-a post Kr.) kaj Mej-ŝeng (140-a post Kr.). Dum la dinastio Tang (618-a—907-a post Kr.) la poezio troviĝas en sia plej brila epoko, kies inda reprezentanto estas Li-taj-pe, eble la plej eminenta lirikisto el ĉiuj epokoj kaj popoloj. Li-taj-pe vivis de 702-a—763-a post Kr. Kiel daŭre ebria, daŭre sankta vagulo li migras tra la ĥina mondo. Artsentemaj suverenoj invitis la glorfaman vaganton al sia kortego, kaj okazis sufiĉe ofte, ke la imperiestro humiligis kaj nobeligis sin mem, fariĝante sekretario de la poeto, kiam Li-taj-pe post drinkfesto diktis al li siajn versojn dum matenkrepuskaj horoj. La imperiestro, kiu frate amis la poeton kaj homon, faris lin imperiestra oficisto, fiksas renton por li kaj donacis al li kiel signon de sia favoro imperiestran luksvestaĵon — por ĥino la plej alta honorigo. Vestita per ĝi, Li-taj-pe travagis ĉiujn vojon de la provinco, kaj vespere, tute ebria lasis sin adori kiel imperiestron. Aŭ li diris en la imperiestra vestaĵo ribelajn parolojn al siaj kundrinkuloj kaj al la popolo ĉirkaŭstaranta. Li mortis ebria, falante el la boato dum nokta boatveturado. Laŭ posta legendo delfeno savis lin kaj sub la protekto de anĝelecaj fantomoj en la supraj sferoj ĝi forkondukis lin sur la maron al eterna nemorteco. Lia popolo adoris lin kaj konstruis

templon por li; la plej arteca el ĉiuj ĥinaj lirikistoj fariĝis ankaŭ la plej populara poeto. — Apud Li-taj-pe oni devas citi la elegian Tu-fu (714-a—764-a post Kr.) — La imperiestro Sien-tsung gravurigas la „mil poemojn“ de Pe Kiu-ys (772-a—846-a post Kr.) en ŝtonojn kaj starigis la ŝtonojn sur sankta monteto. — Su-tung-po (1036-a—1101-a post Kr.) estas la kvara el la grandaj lirikaj majstroj. Li verkis la plej belajn ĥinajn poemojn pri amo. — Jang-ĉang-tsaj (1715-a—1797-a post Kr.) estas la plej konata el la postaj lirikistoj. Je la fino de la deknaŭa jarcento la eminenta politikisto Li-hung-ĉang akiris famon ankaŭ kiel lirikisto.

En la ĥinaj dramoj agas herooj, heroaj virgulinoj, sorĉistoj, demonoj. Ju malpli la ĥino mem estas kaj volas esti heroo, des pli li ŝatas, rigardi lin sur la scenejo. La ĥina teatro okazas en libera naturo aŭ en templa korto kaj bazas ekskluzive sur improvizado. Dekoracioj ne ekzistas. La kostumoj estas riĉaj kaj pompaj. La aktoro vestiĝas kaj ŝanĝas la kostumojn sur nefermita scenejo. La medio de la dramo estas simbole skizata. Ujo kun akvo signifas torentan pluvon. Flameto mondbrolon, Muziko de tamtamo, violono kaj fluto akompanas la prezentadon, kiu ne estas interrompata de aplaŭdo. Silente la ĥinoj staras sub arboj aŭ sidas sur seĝoj mem alportitaj. Cetere la aŭtoroj de la burĝaj komedioj ofte estas aninoj de la „duonmondo“, kiuj starigas el la profundo de sia koro „plenan mondon“.

La prozo montras kiel heroon de la okazaĵo preskaŭ ĉiam la samajn tipojn: studanton, kiu amas la filinon de mandareno. Senfinaj intrigoj, plenigantaj ofte centojn da volumoj, ĉirkaŭas la tuton. La aŭtoro jam en la tria volumo ne scias plu, kion li skribis en la unua, kaj en la dudeka volumo la herooj de la unua jam ĉiuj formortis kaj cedis la lokon al aliaj. La tuto ja nur estas, kiel sur scenejo, ŝanĝo de la kostumoj. — ĉarmaj estas la ĥinaj fabeloj, malgrandaj noveloj kaj la rakontoj pri demonoj kaj fantomoj.

(El Historio de la mondliteraturo en unu leciono de Klabund)

— *Esperanto* 12/1925

MALNOVA KAMPO DE BATALO

de Li Hua⁴ trad. K. Ossaka

For, for, stepa ebenaĵo senlima... Neniu homa figuro videbla...Rivero serpentumas, montaro sin kaŭrigas. Ĉio melankolia, ĉio korpremana. Plorĝemas la vento, nebulas la suno. Artemizioj ŝiritaj, herbaĉoj mortintaj. Pikas kvazaŭ en frosta mateno! Birdoj ne revenas forflugintaj, bestoj malaperas forkurintaj.

⁴ La aŭtoro estis literaturisto en la epoko de Tung, poste oficisto regna (Ĉirkaŭ 750 post Kristo).

La mastro de l' gastejo al mi diris: Tio estas malnova kampo de batalo. Iam pereis armeoj da soldatoj. Ofte aŭdiĝas demonaj ĝemoj, se mallumiĝas la ĉielo.

Ha, korŝira vido premeganta! Ĉu en la epoko de Ĉin aŭ Han? aŭ en tempo pli moderna? Rakontas historio. Gvardioj de Ĉaj-ŭej, rekrutaro de Ĉin-Han, kurigitaj tra miloj da mejloj, elmetitaj dum longaj jaroj. Ĉevalojn oni paŝtas per stepaj herboj en frua mateno, glaciajn riverojn oni transvadas dum malfrua nokto. Supre eterna ĉielo, sube vasta tero: forkuri hejmen oni ne povas. Almetitaj al la bataliloj, al kiu plendi la timigataj koroj? En Ĉin-reĝimo pli ofte, ol en tiu de Han, oni havadis militojn kontraŭ barbaroj ĉiuflankaj. Dume malfruktiĝadis la Mezlando. Tiujn mizerojn travivis ĉiu reĝimo. En antikva tempo, oni diras, la barbaroj cedadis antaŭ la Mezlandaj armeoj. Kulturo malprogresiĝis: trompon artifikis la generaloj. Jen maljusteco, kontraŭmoralo! La regado proksimevida, senpotencigis. Ho, ve! Mi vidas: Blovegas sur sablejo norda vento, spionas trupoj barbaraj. Senzorgas la ĉefkomandanto kaj atakon ricevas la tendaro. Sur la kampo oni starigas standardojn, en riveroj oni aranĝas ŝnurplektaĵojn. Disciplino senkompata, la koroj timantaj. Ordonoj devigaj, vivoj senvaloraj. Sago akrega disrompas la oston, sableroj furiozaj enbatiĝas en la vizaĝon. L'amikoj kaj la malamikoj bategas unu la alian. Tremegas la tero. La krioj rompas riverojn, la fortoj superas tondrojn. En severa

vintro, kiam frostas de monto al maro, la neĝo falinta kuŝiĝas ĝis genuoj, glacio dikega nestiĝas en la barbo. Rabobirdoj ne volas ekflugi, militĉevaloj ne volas ekpaŝi. La vestaĵo dikkotona ne varmigas. Defaliĝas la fingro, ekfendiĝas la haŭto. En tiu ĉi tranĉa malvarmo la Ĉielo donas al la barbaroj harditaj pli da ardanta spirito por buĉado. Tuj rekte ili atakas la provizejojn, de flanke ili sin ĵetas sur la trupojn. Estas kapitanoj mem ekkaptitaj, generaloj mortigitaj. Amasiĝas kadavroj ĉe bordo de golfego, plenfluas sango en kavernoj de fortikaĵoj. Ĉu alterangaj, ĉu senrangaj, egale ĉiuj fariĝas ostoj... Ho, haltu, jam ne plu!

Sveniĝas tamburado,

Vaniĝas la penado;

Pafarko-senfadena,

Sagujo jam malplena...

En varmega manbatalo

Peciĝis glav', ho ve !

Por ĉiu nur pere'

Decidiĝas la fatalo.

Kaj en kapitulaco —

Ĝismorta la minaco;

Kaj resti en batalo —

Fariĝi ost' en falo!

Ho, birdoj sen kanto.

Montaro silentaj,

la nokto konstanta, Fajfado de l' vento.
Animoj kruciĝas,
Ĉielo ja mutas,
Diabloj kuniĝas,
Nubar' persekutas.

Sen forta la suno, ...
Velkiĝas herbaĵo;
Malgaja la luno, ...
Briletas frostaĵo...

Ho, diru, ĉu estas io la koron pli doloriganta? Legu el la historio. Mu kondukis soldatojn el Ĉao kaj disbatis Lin-barbarojn. Vasta teritorio akirita, la malamikoj malproksimen forpelitaj. Tio tamen faligis Han-landon en bankroton kaj pereon. Troa fido al homoj, kaj nenio plu! Ĉou-armeo norden forkurigis Jen-Jun barbarojn ĝis Taj-Jŭan, kie ili konstruis fortikaĵojn kontraŭ la nordo kaj revenis nedifektitaj. Ili feste drinkis kaj disdividis rekompencojn meritajn. En paco kaj en harmonio. En pompo kaj en festoj. Regantoj kaj regatoj en konsento. Ĉin komencis la konstruon de Dekmilmeĵla Kastelmuro, kuranta ĝis la Maro. Pereis sennombraj vivoj; ĝin ŝmiris la sango. Han venkis Hsuing-Nu barbarojn kaj ekokupis Jin-Ŝan. Tamen kovris la kampojn falintaj kadavroj. Malpli da gajno, ol la perdo!

Ĉu popolo, se nenobla, ne havus gepatrojn? En karesa ĉirkaŭbrakado deziras ili al sia kara longan vivon. Ĉu li ne

havus gefratojn? Nedisigeble kunigitaj ili estas, kiel manoj kaj piedoj. Ĉu la edzinon? Ŝi lin amas kaj respektas, kiel amikino aŭ gastino. Kiu donis al li la vivon? Kiu do estus kulpa, se li lin mortigus? Ĉu li ankoraŭ vivas, aŭ jam li mortis? Nenia sciigo ĉe la hejmo. Iu donas informon pri lia morto. Ĉu kredi, ĉu ne kredi, Dio nur scias. Peziĝas la koro. En sonĝoj lin oni vidadas. Funebran altaron oni aranĝas, pro lia memoro oni trinkas. En plorego oni rigardas alten al la ĉielo. Funebras ankaŭ la tero kaj la ĉielo, malgajas la naturo... Se ne paco al la cindro, ne saviĝos la perdita animo. Venos nepre malfeliĉo, okazos nepre mizerego. Ho ve, tia la destino! Samaj ripetoj de antikve... Kion do fari? Fi, atakemaj barbaroj ĉiam ĉiuflanke!


— *La Revuo Orienta* 1/1921

La centro de la mapo

En la 16a jarcento, la itala misiisto Matteo Ricci portis al Ĉinujo eŭropan mapon pri la mondo kun la novaj malkovraĵoj en Ameriko. La ĉinoj ŝatis ekscii pri Ameriko, sed unu afero en la mapo ofendis ilin. La mapo dividis la mondon laŭ la mezo de la Pacifika Oceano, kaj Ĉinujo do situis je la dekstra rando. Sed la ĉinoj pensis pri si mem kiel la “Regno de la Mezo”, kaj ĝi devus esti meze sur la mapo.

Por trankviligi ilin, Ricci desegnis alian mapon, kiu dividis la mondon laŭ la Atlantiko, kaj sur ĝi Ĉinujo estis pli centra. Oni ankoraŭ nun kutimas desegni mapojn tiel en tiu parto de la mondo.

Eŭropanoj daŭre tenas sin ĉe la unua speco de mapo, sur kiu Eŭropo troviĝas en la supra centra parto. La plej



kutimaj mapoj en Nordameriko montras Usonon en tiu honora loko, eĉ kun la konsekvenco ke la mondo dividiĝas tra tiu kontinento.

La emo, meti ne nur la propran landon en la mezon de la mapo, sed ankaŭ la propran popolon en la centron de la historio, ŝajnas troviĝi ĉie.

Ekzemple, multaj ĉinoj supozis ke la Ĉiela Templo en Pekino troviĝis ekzakte en la centro de la surface de la tero. Jam en la mezepoko, ĉinaj edukitaj homoj sciis pri la proksimuma situo de Eŭropo, Afriko kaj la Hinda Oceano. Tamen eĉ historiistoj opiniis ke en la ĉina imperio troviĝis

ĉiu civilizo.

Por la mezepoka mahometano, la centro de la mondo estis la naskiĝloko de Mahometo, Mekka. La mahometanaj edukitoj sciis ke la tero estas globo. Ili pensis ke la loĝata kvarono de la globo estas lando inter la ekvatoro kaj la norda poluso kaj inter okcidenta kaj orientaj oceanoj, do proksimume Eŭropo, Azio kaj norda Afriko.

La mahometanoj imagis al si ke la loĝata mondo estas dividita en sep klimatoj de sudo al nordo. La varmo de la sudo igis la homojn lacaj kaj ne civilizitaj. En la nordo estis tiel malvarme ke la homoj fariĝis palaj kaj iliaj mensoj malrapidaj. Nur en la centraj klimatoj, kiel en la mediteraneaj landoj aŭ en Irano, la mensoj estis plej aktivaj kaj la civilizo plej progresinta. De tie oni iom post iom disvastigis islamon al la negroj en la sudo kaj la blankuloj en la malvarma nordo.

La okcidenteŭropanoj de tiu tempo havis plurajn el la samaj ideoj pri historio kaj geografio kiel la mahometanoj. Sed ili interpretis en alia maniero. Inter la posteuloj de Adamo, Dio elektis unue la hebreojn, sed poste la kristanojn. Inter la kristanoj Li poste faris ankoraŭ selekton favore al la okcidenteŭropanoj sub la papo de Romo.

La okcidenteŭropanoj lokigis la centron de la mondo en Jerusalemo. Iliaj mapoj eĉ povis montri ke la distancoj de Jerusalemo al Hispanio kaj al Ĉinujo estas egalaj. En la komenco de la historio, la paradizo troviĝis tie kie la suno

leviĝas, kaj ili opiniis ke nun la centro de la dia regno devas esti tie kie la suno subiras, en la okcidento.

Se oni rigardas nuntempan eŭropan maparon, oni ofte trovas apartajn mapojn pri ĉiuj eŭropaj landoj, kaj je la fino kelkajn paĝojn pri la ceteraj partoj de la mondo.

Sur monddiagramo farita laŭ la skalo de Merkator, Eŭropo ne nur aperas je la supra centro, ĝi ankaŭ ŝajnas multe pli granda ol la aliaj grandaj kulturregionoj. Eŭropo situas plejparte norde de la 40a latitudo. Norde de ĝi, la skalo de Merkator multe troigas la grandecon de ĉio por ke la normale ronda terglobo aperu ĝuste ankaŭ sur la plata papero. Tiamaniere fariĝas loko por multaj nomoj en Eŭropo, sed oni bezonas indiki nur la plej gravajn ekzemplo en Ĉinujo.

Ekzistas aliaj sistemoj de skaloj, en kiu la formoj kaj grandecoj estas malpli torditaj, sed la eŭropanoj kompreneble restas ĉe sistemo kiu estas tiel flatanta por ili.

Oni kelkfoje aŭdas la rakonton pri malgranda tribo kiu havis la saman vorton por “homaro” kiel por la tribo mem. Aliaj triboj estis pure hazardaj en ilia bildo pri la mondo, eble la aliaj eĉ ne estis tute homaj. Ĉinoj, mahometanoj kaj okcidentanoj, ĉiuj ridetas iomete tro rapide pri la sufiĉe danĝera naiveco de la malgranda tribo.

Marshall G. S. Hodgson el Unesko-Kuriero

trad. kaj mallongigis U. Luin

— *La Praktiko* 3/1970



Oraj fajreroj ekbrilis en la aŭtunaj vespernuboj, ekbrilis kaj malrapide estingiĝis... Kaj la pala tago aliformiĝis je malklara krepusko... lastaŭtuna krepusko... Kvazaŭ granda morte-vundita birdo senforte mallevis teren siajn cindrokolorajnflugilojn... kvazaŭ sopiranta birdo per larĝaj mallumajflugiloj ektuŝis mian koron...

Senmove staras la nigraj arboj, senbrue etendiĝas la nudaj branĉoj, falas kun arĝenta sono la malfruiĝintaj folioj... Sensone ĝemante falas ies mortantaj revoj... Ĉu vi aŭdas, kiel mortas ili dum silento de la krepusko... la lastaŭtuna krepusko?... Ĉu vi aŭdas? ! ...

Densa nebulo, kvazaŭ blueta mortotuko, envolvas potence la malvarmiĝantan naturon... envolvas mian senton... Morgaŭ malpezaj neĝeroj teksas blankan tapiŝon... Senkompata glacia tavolo kovros la tombon de l' aŭtuno... la tombon de mia sonĝo...

Pli kaj pli mallume fariĝas super la tero... Kvazaŭ

granda morte-vundita birdo, adiaŭante la vivon, senforte mallevas siajn larĝajn, cindrokolorajn flugilojn... Adiaŭante la sorĉan fabelon, pli kaj pli malrapide batiĝas mia koro dum la lastaŭtuna krepusko...

Originale verkis **Ritka De-Kapreleviĉ**, Tiflis.

— *Revuo* 13/1923

Ĉinaj Paraboloj

Venlo Fon

MALKONTENTECO

Maljunulino profesie faris brandon. Daoisto ⁵ vojaĝante loĝis ĉe ŝi. Kiam li petis pri brando, ŝi ĉiam donis al li. Li trinkadis kelkcent kruĉojn kaj al ŝi ne pagis. Tamen ŝi ne disputis kun li pri tio.

Iutage la daoisto diris al ŝi:

"Mi ne havas monon por pagi vian brandon. Mi fosu puton por vi."

Fosiĝis la puto kaj elspruĉadis forta brando.

"Per ĉi tio mi vin pagas", li diris kaj foriris.

La maljunulino ne plu faris brandon kaj nur vendis tion, kio elspruĉis el la puto. Tiu brando estis pli bona, ol kion ŝi faris. Multe da aĉetantoj venadis.

⁵ Daoismo, religio de Ĉinio

En tri jaroj ŝi gajnis kelkdek milojn da mono kaj riĉiĝis. Iutage neatendite la daoisto denove venis. Ŝi lin dankegis.

"Ĉu la brando estas bona?" li demandis.

"Bona ja ĝi estas, nur la porkoj ne havas feĉon por manĝi."

Ridetante la daoisto, skribis sur la muron la jenan versaĵon:

"Eĉ fluginte ĝis la ĉielalto

Homa kor' ne scias ja pri halto:

Vendiĝas putakvaĵo kiel vin',

Ho ve, ne havas feĉon la porkin'!"

Fininte la versaĵon, li foriris. Kaj el la puto ne plu elvenis brando.

PRETENTEMO

Lin Ĉun-je, guberniestro de Fuĝien, celebris la 99-an datrevenon de sia naskotago.

Najbaro lin gratulis, dirante:

"Ankoraŭ cent jarojn al vi!"

"Mi ja ne petas de vi nutradon," diris la guberniestro kolere, sed ridetante, "kial limigi mian vivdaŭron?"

— *Literatura Mondo* 5/1937





Septembra vento muĝas furioze, kaj forĉasas
 Pajltegon tritavolan de sur la kaban' pretere.
 La pajl' transflugas fluon kaj sin disĵetita lasas:
 Jen surkroĉiĝas al arbsupro alta mallibere,
 Jen kirle-flirte falas en ŝlimmarĉon ĉe-rivere.

La knaboj de la sudvilaĝ', ho aroguloj! en la plena tago

Rabisle agas, mian maljunecon primokante,
Enkuras bambuaron, pajlo sub la brako!
Kun lang' kaj lipoj sekaj, vane alvokante,
Suspiras mi rezigne sur baston' min apogante.

La vento mutos baldaŭ kaj inknigros nubtavolo,
Ĉielon nebulgrizan surprizkaptas jam vesper',
Mia multjara litkovril' glacias kvazaŭ fer',
Pro l' buba piedbat' ŝiriĝis ĝia suba tolo.

La pluv' senĉese falas kvazaŭ stangoj de lupolo,
Tegmenton trafenstras ĉe l' litkap' — sen seka ter'.
Malmulte mi jam dormis pro la migrada sufer',
Sur la malsekaĵo kiel ja ripozi ĝis aŭroro?

Se dekmilĉambra palacego ie estus nur,
Sub kies ŝirm' la malriĉuloj de l' tutmondo vivas
korkontente,
Kaj spite ŝtorm' ĝi starus montsimile en sekur'.
Ho! kiam antaŭ mia okulpar' leviĝos ĉi domego
monumente,
La domrompiĝon propran kaj malvarmon mi suferos
senlamente!



Al la "Esperantisto"

Ein Freund



48

En bona hor'! Ni aŭdis la signalon,
Kaj bataleme saltas nia koro.
Konduku nin, komencu la batalon
Sub bona stelo, en feliĉa horo!

Amikoj de proksime, malproksime,
Salutas vin, ho nia luma stelo!
Konduku nin senhalte kaj sentime
Al nia granda, sankta, glora celo!

Ne tre facila estos nia vojo
Kaj ne malmulte ankaŭ ni suferos,
Sed batalante kun plej granda ĝojo
senhalte ni laboros kaj esperos.

For estas jam la baroj de l' komenco,
L' unua muro estas trarompita,
kaj dolĉa estos nia rekompenco,
Kiam la celo estos alvenita!

Atendu!

Jos. Siml

Patrino, patrino,
Mi malsatas.
Donu al mi panon,
Alie mi mortos!

Atendu, infano mia kara,
Ĝis la greno estos falĉita!



Kiam estis falĉita la greno,
Tuj revenis la infano:

Patrino, patrino,
Mi malsatas.
Donu al mi panon,
Alie mi mortos!

Atendu, infano mia kara,
Ĝis la greno estos draŝita!

Kiam estis drasita la greno,
Tuj revenis la infano:

Patrino, patrino,
Mi malsatas.
Donu al mi panon,
Alie mi mortos!

50

Atendu, infano mia kara,
Ĝis la greno estos muelita!

Apenaŭ estis muelita la greno,
Tuj revenis la infano:

Patrino, patrino,
Mi malsatas.
Donu al mi panon,
Alie mi mortos!

Atendu, infano mia kara,
Ĝis la pano estos bakita!

Kiam estis bakita la pano,
Ne revenis la infano.
Ĝia buŝo mutiĝis.
Kaj milde ripozis
La mortinta korpo
Sur la katafalko.

Skatolo da Tefolio

Yin Jiaxin

Somere de 2002, sinjoro Wan, mia intima amiko, transloĝiĝis aliloken pro sia entrepreno. Antaŭ la adiaŭo li donacis al mi skatolon da tefolio. Mi malofte trinkas teon, kaj pri tio mi konas ankaŭ malmulte.



Sinjoro Zhou amikiĝis kun mi jam dekelkajn jarojn. Li kaj lia edzino ambaŭ tre ŝatas teon kaj bone konas diversajn tefoliojn.

Oni diras ke, "Spadon donacu al kavaliro, ŝminkon donacu al belulino." Do, al sinjoro Zhou mi donacis la tefolion de sinjoro Wan.

La tefolio tre plaĉis al gesinjoroj Zhou, kiuj diris, ke ili neniam vidis tian bonan tefolion, kia ĝi: la tuta ĉambro tuj pleniĝis de bonodoro, ĵus kiam ili infuzis la teon, kaj pli mirinde estas, ke la teo helpas plibonigi dormadon, dum plej multaj alispecoj refreŝigas menson.

Post Kelkaj tagoj sinjoro Zhou telefonis al mi demandi, ĉu mi bezonas ian helpon de li.

"Ne." Mi respondis.

Sekvatage, lia edzino ankaŭ telefonis al mi demandi,

ĉu mi bezonas ian helpon de ŝi.

“Ne.” Mi respondis.

Min konfuzis iliaj telefonoj. Sinjoro Zhou kaj lia edzino servas en la urba registaro kiel oficistoj kun forta potenco. De ili oni ofte petis favoron per flatado, sed tion mi neniam faris.

52

Baldaŭ, gesinjoroj Zhou vizitis min. Dum la interbabilado, ili denove demandis, ĉu mi bezonas ilian helpon. Mi la kapon skuis, dirante, “Mi scivolas, kial vi ĉiam divenas, ke mi bezonas helpon de vi.”

“Pro la tefolio,” sinjoro Zhou diris, “ni jam konsultis specialiston. Tiu specia tefolio estas speciale farita, kaj nenie aĉeteblas. Taksite, la skatolo da tefolio tre altvaloras. Kial vi donacis al ni tian karaĵon, se vi ne petas de ni ian helpon?”

Aŭdinte lian diron, mi ne sciis, ĉu plori aŭ ridi.

Mi telefone demandis sinjoron Wan pri la tefolio, kaj sciigis ke, dum sia inspektado en nia urbo, prezidanto Jiang disdonis po skatolon da tefolio al ĉiuj altrangaj oficialuloj, inter kiuj troviĝis la patrino de sinjoro Wan; ŝi neniam trinkis teon pro suferado de sendormeco. Fakte, ambaŭ sinjoro Wan kaj lia patrino ne sciis la prezon de la tefolio.

Veraj amikoj inter si zorgas nur pri amikeco ol valoro de l' donaco.

河南世界语运动纪事（续）

2004 年

6 月初，绿太阳网开通上线。

6 月 27 日，河南郑州、洛阳、新乡、封丘等市（县）的世界语者会聚郑州，在全国世协理事张晃光教授主持下，宣布第 89 届国际世界语大会河南代表团正式组成。团长：张晃光，副团长：郭喜照、韩道翥，秘书长：孔雷，代表团成员：马海滨、毛忠华、刘家合、吉峰、胡海龙、郭志军、崔忠平、韩优。当天中午河南代表团成员共进午餐，并观看了新乡世协选送的戏曲武术节目。

7 月 24 日至 7 月 31 日，以张晃光教授为团长的河南世界语代表团 11 人参加了 89 届国际世界语大会。来自世界各地 50 多个国家的世界语者围绕大会主题“国际关系中的语言平等”展开了友好交流。

8 月 19 日下午，巴西世界语者 Josias Barboza 乘车到郑州，同郑州世界语者张晃光、孔雷、王瑞、王洪斌等一起亲切交谈，一同欣赏了 89UK 照片，并在张晃光教授家共进晚餐。在郑州期间，s-ro Josias Barboza 由孔雷、王洪斌同志陪同游览了嵩山少林寺，并到郑州二七广场、人民公园等观光市容市貌。据了解，在来郑州前，Josias Barboza 先生还访问了河南洛阳，得到了当地世界语者曹瑞明、吉峰等同志的热情接待，游览了龙门石窟等名胜。

2005 年

1 月 1 日至 3 日，“中国世界语发展论坛”在河南省洛阳市洛阳大学国际学术交流中心举行。来自内蒙古、辽宁、云南、山西、陕西、江苏、浙江、湖北、河南以及澳大利亚、新加坡的世界语

专家学者、以及世界语爱好者 50 余人参加了论坛进行研讨交流。国际世界语协会机关刊《Esperanto》2005 年第 2 期刊发了张雪松写的会议报道。

2005 年春，信阳张雪松将巴西世界语学习软件 *Kurso de Esperanto 3.2* 版翻译成中文，湖北世协将其收录到光盘发行。

5 月 3 至 5 日，世界语滕王阁会议在南昌市举行，收录 25 篇论文成集，河南洛阳曹瑞明的论文入选。

6 月 19 日，来自新乡市各行业的世界语爱好者及协会会员 30 余人聚会一起共同庆贺新乡市世界语协会成立 20 周年。

2007 年

5 月 1 日—5 日，2007 世界语旅游活动在开封举行。在河南大学学术交流中心开幕后的几天里，与会者除了游览铁塔公园、清明上河园、大相国寺、开封府外，还举办了世界语教学活动。来自陕西西安、江西、河南郑州、开封、新乡、洛阳、河北邯郸、湖北黄石等地的世界语者和来自法国、美国、韩国的外国友人共 55 人参加了活动。

6 月 11 日，据“大河网”河南日报农村版 03 乡村教育“西华县开展评选‘敬老童星’活动”一文报道：素有“南阳张海迪”之称的残疾女士张虹（46 岁）自学了世界语等四种语言。

10 月 14 日，新乡市世界语协会召开了理事会会议，传达了第 7 届全国世界语大会精神。

11 月，信阳市张雪松以世界语为蓝本，将法国社交网站 <http://www.ipernity.com> 翻译为中文（前期与人合作），于 2008 年春节正式上线。该网站是当时最活跃的国际世界语者社交平台。

2008 年

7 月，第 5 届东北三省及内蒙古地区世界语大会书画剪纸艺术

大展，河南刘国容、戴茜茜、伊高峰在首届中华“世界语”全国书画美术大赛中获银奖。

2007 年底新乡学院同意开设世界语作为选修课并计入学分，2008 年该院开办三期世界语选修课，为世界语运动培养了许多积极分子。

2009 年

2 月 28 日，新乡学院开设的世界语选修课正式开班（每周一次，每次两个学时），容纳 60 人的教室座无虚席。参加选修课的学生均为大一和大二的学生。

12 月 4 日，郑州《商都网》报道，第 8 届全国世界语大会在南京召开。会上确定了新一届全国世协理事名单：河南马海滨、曹瑞明为理事，张昊光、郭喜照、韩道翥为名誉理事。

12 月，张雪松与肖火力合作，将茶花网更名为中国世界语网 (www.esperanto.cn)。同年，他开始翻译 ipernity 网站手机版。

2010 年

春节，信阳张雪松翻译的 ipernity 网站手机中文版上线。

7 月，孔雷在 ipernity 上开通世界语博客，同外国朋友用世界语交流。

9 月，河南世界语博客网在在百度空间正式开通。

2011 年

2 月，受中国世界语运动史专家侯志平老师的委托，孔雷同志开始参与《中国世界语人名录》（河南篇）的编写工作。

7 月 24-28 日，比利时世界语者 Bart Demeyere 带儿子 Thomas 到信阳张雪松家作家庭交流。在信阳期间张雪松一家陪同巴特父子浏览了信阳鸡公山，南湾湖、信阳博物馆等。

2012 年

7月，匈牙利世界语者 Janos Avraham Sipos 正在学习中文的儿子 David 来中国体验生活，在信阳张雪松家住了五个星期，并在暑期班补习中文。张雪松还根据 Janos 的愿望，安排 Davido 去了一趟洛阳，得到当地世界语者吉峰和张冬的热情接待。

在中国世界语人物志河南篇的编写工作中，新乡等地世界语者给予了大力支持。

2013 年

7月26日，《大河报》记者采访洛阳市吉峰，并做专题报道《今天是世界语创立日，本报记者寻访世界语中的洛阳元素——世界语：在洛城渐渐沉寂的语言》。

7月，QQ 中原世界语群举行庆祝世界语第一书发表 126 周年群聊活动。

11月，马海滨、孔雷、贾荣霞等到山东省枣庄参加了第 10 届全国世界语大会。

2015 年

6月13日，新乡市世界语协会 120 多人庆祝协会成立 30 周年。

9月16日，“太极康乐”在大河网《眼遇精彩》专栏发表主题贴《咱们一起来说世界语吧》，浏览量达 23785 人次。

10月，郑州、洛阳等地世界语者为原河南世协理事长张昊光祝贺 90 大寿。

12月12日，河南郑州、新乡、洛阳的世界语者齐聚省会举行了柴门霍夫节庆祝活动，微信中国报道世界语新闻进行了报道。

12月15日，“太极康乐”在大河论坛《博闻天下》专栏发表主题贴《纪念河南世界语者卢成之诞辰 100 周年》，浏览量达 59563 人次。

2016 年

5 月 21 日，郑州孔雷、洛阳吉峰赴上海参加了沪浙苏豫陕世界语论坛预备会。

5 月，新乡金建雄创建 QQ 群“新乡与各地世界语活动”。

9 月 8 日至 10 日，孔雷、王宝生、贾荣霞等 30 多位同志赴杭州参加了首届沪浙苏豫陕世界语论坛，新乡红杜鹃艺术团表演了“遵义会议放光芒、高粱熟了”两个节目。

9 月 25 日，河南世界语工作座谈会召开，河南资深世界语元老郭喜照、新的世界语领军人马海滨以及来自新乡、洛阳等地的世界语者参加了会议。会议听取了孔雷同志关于河南世界语者参加首届沪浙苏豫陕世界语论坛的情况汇报，并就推进河南世界语工作畅所欲言，开展了讨论，形成了共识。会议研究决定积极做好河南世界语组织建设，筹备召开第一届河南世界语者大会，为重新复兴河南世界语运动做出不懈的努力。

12 月 10 日，河南世界语者联盟（Henan-a Esperantista Grupo）成立，马海滨任总干事，

12 月 11 日，河南世界语者联盟主办的第 1 届河南世界语者大会在新乡市老干部大学会议大厅举行。河南世界语者联盟马海滨总干事致开幕词。大会授予河南世界语运动前领导人张昊光、郭喜照“柴门霍夫奖”，以表彰他们对河南世界语运动的贡献。

2017 年

1 月 21 日下午，新乡市世界语协会在新乡市平原路田园茶吧召开理事会，总结 2016 年工作和展望 2017 年工作计划。

2 月 26 日，新乡世协在 134 厂举行理事扩大会，决定成立新乡世界语艺术团。

4 月 2 日，新乡市世界语协会刘家和理事长、贾荣霞秘书长等

主要成员到新乡县七里营镇龙泉村参观花展，向小朋友们宣传世界语；小朋友们看到绿星旗感到很新奇，跟着贾老师朗读起了世界语。

4月14日，为纪念柴门霍夫年，新乡市世界语协会贾荣霞秘书长组织世界语艺术团瑜伽队的全体成员到龙蛟泉园宣传世界语，向幼儿园的孩子们讲解了什么是世界语，练习了发音，一起合影。

4月28日，新乡市世界语艺术团在中航工业新航集团的灯光球场大舞台举行成立首次慰问演出，新乡市世界语协会秘书长贾荣霞用世界语报幕，并向观众发世界语宣传资料。

5月17日，有河南世界语者张磊以及湖北、山西、辽宁、吉林、黑龙江等省世界语爱好者参加的秦皇岛世界语沙龙公益教学开课，开封张磊协助哈尔滨宇通世界语发展研究所宋萍执教。

5月19日至24日，新乡市世界语协会接待了来自浙江省世界语艺术团冯雪珍副团长等4位同志，并一起到开封旅游。新乡市世界语协会准备以“农家乐”模式开展世界语者之间的文化、旅游、文艺活动，欢迎全国各地世界语者到新乡。

5月27日至28日，开封市张磊到哈尔滨参加了第九届哈尔滨青年世界语研讨会。

5月30日，www.esperanto.studio“世界语工作室”网站建成试运行，网站由信阳市世界语者张雪松建立并管理。

7月9日，郑州市世界语者举行纪念世界语诞生130周年座谈会。郭喜照、马海滨、孔雷、唐洛、王瑞、赵华等出席，会上传阅了《河南世界语运动简史》样书。

7月20日，河南世界语者联盟举行网络会议，研究通过了第2届河南世界语者大会的主题、日程安排等有关事宜。

8月，河南世界语者联盟主办的电子杂志《Flava Rivero》（黄河）正式创刊，并在世界语工作室网站上线。

9月，经过安阳世界语者的多方努力，终于确定了第2届河南世界语者大会的会场。河南世界语者联盟据此发出了会议通知。

10月，侯志平、李建华主编的《中国世界语人名录》由山东大学出版社出版，河南世界语者提供了有关人物材料。

10月20日—22日，第2届河南世界语者大会在安阳举行，安阳、开封、郑州、洛阳、新乡等地近30名世界语者参加了会议。来自西安、沈阳、丹东的世界语者也参加了会议。

11月3日—5日，第2届五省市世界语论坛在上海举行。河南世界语者刘家、孔雷、王宝生、赵华、贾荣霞、赵爱华等参加。

12月15日，新乡世界语协会在134厂举行了纪念柴门霍夫博士158周年活动。同日，河南部分世界语者也通过网络微信表示祝贺，在学习交流中度过世界语者节日。

2018年

2月12日，郑州马海滨、孔雷、赵华、唐洛等同志到郑州市第四人民医院看望了河南世界语元老郭喜照同志。

春节期间，吉峰和吉逸翔一起走访天津市世界语协会，参观了世界语收藏小屋。访问期间，洛阳世界语者受到天津世界语者韩祖武、曹葆柱、韩大强等同志的热情接待，双方围绕世界语的学习运用进行了交流。

3月3日，郑州孔雷在洛阳拜访了原洛阳市世界语协会理事长李青、秘书长王洋，并同洛阳世界语者联盟吉峰、刘朝阳、赵红霞、王晓琴、张春芳等同志亲切会晤，就编好《河南世界语运动简史》、开好郑州世界语会议进行交流磋商。（续完）




世运短波

★ 3月，世界语工作室和《黄河》编辑部出版了国内首部世界语有声读物——科幻小说《La Kimero》。该书经作者授权在中国出版发行。

★ 6月，世界语工作室出版了张雪松汇编的柴门霍夫《世界语改良方案》。该书收录了柴门霍夫1893年12月至1894年11月发表在《世界语者》杂志上的完整的世界语改良方案及相关文章，是研究柴门霍夫及世界语的重要资料。

★ 世界语博物馆今年6-8月先后收到张枚生、张锴生捐赠的原河南省世界语协会理事长张晃光教授遗物共500余件，包括公章印模、荣誉证书、图书杂志、文件资料、相册等。博物馆对此表示感谢。

★ 南阳青年世界语范骄阳和新乡世协秘书长贾荣霞多次应邀担任西安世协主办的网络论坛主持人。



主营国内外世界语图书

网址: <http://shop.kongfz.com/41603>

电话: 16638485598

微信: deodaro

